

# UNUA BULTENO

## de la 40-a Pola Esperanto-Kongreso en Siedlce, 20-23.07.2023



**Organizantoj:** Pola Esperanto-Asocio – Ĉefa Estraro, Filio de PEA  
en Siedlce, **Tempo:** 20-23.07.2023 (ĵaŭdo – dimanĉo)

Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio kore invitas al la 40-a Pola Esperanto-Kongreso. Post komuna Virtuala Pola Germana Esperanto-Kongreso kaj kongreso en Łódź, nun unuan fojon PEK okazos en Siedlce, 95 km oriente de Varsovio. Trajna vojaĝo de Varsovio ĝis Siedlce daŭras, depende de trajno, de 60-ĝis 75 min.

### Skiza programo:

#### 20.7.2023 ĵaŭdo

9:30 - 18:00 - tuttaga ekskurso „Historio, naturo kaj nuntempo - ne nur en Siedlce” (kun tagmaĝo).  
19:00 - vespera renkontiĝo en la kongresa tranoktejo.

#### 21.7.2023 vendredo

10:00 – malfermo de la Kongreso, prelegoj.  
14:00 - 15:00 – manĝopaŭzo.  
15:30 - 18:00 - prelegoj, vizitado de la urbo.  
18:00 - 21:00 - arta programo.

#### 22.7.2023 sabato

9:30 - 14:30 - programo, prelegoj.  
14:30 - 16:00 - manĝopaŭzo  
16:30 – 18:00 - programo, E-diservo  
18:30 – 21:00 - arta programo

#### 23.7.2023 dimanĉo

10:00 - 12:00 - prelegoj, resumo de la Kongreso, fermo.  
13:00 - 14:00 - manĝopaŭzo,

**Ekskurso:** "Historio, naturo kaj nuntempo - ne nur en Siedlce " la 20.07.2023 kun tagmanĝo. **Deviga antaŭpago** 95 zł. ĝis 1.06.

9:30 – renkontiĝo antaŭ la tranoktejo, 10:00 - forveturo, (ĉirkaŭ) 18:00 - reveno  
La prezo de la ekskurso inkluzivas: enirbiletojn, tagmanĝon, asekuron.

Skiza programo de la ekskurso: - Vizitlokoj

**Mokobody** – vizitado de la novklasika preĝejo al Sankta Hedwiga, konstruita laŭ la projekto de Jakub Kubicki. Ĝi estas kvaroble pli malgrandita temploprojekto de sanktejo-oferdono (kiun oni planis konstrui en Varsovio) pro la Konstitucio de la 3-a de majo, distingita de reĝo Stanisław August Poniatowski en arkitektura konkurso por la templo.

**Węgrów** - vizitado de la urbo, Baziliko al Ĉieliro de Virgulino Maria kaj Sanktuloj: Petro, Paŭlo, Andreo kaj Katarina. - la interno estas riĉe ornamita en la baroka stilo kun polikromioj kaj freskoj de Mikelaĝelo Palloni el la jaroj 1707-1708. La preĝejo enhavas la Spegulon de Twardowski - laŭ legendo, magia artefakto. Post-Reformata



Aliĝiloj kaj kontatoj: [www.esperanto.pl](http://www.esperanto.pl)  
Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)  
Zofia Śmistek, [zosiasmistek@wp.pl](mailto:zosiasmistek@wp.pl)  
<https://eventaservo.org/e/300538>

komplekso, kiu konsistas el monaĥejo kaj preĝejo al. la Sanktuloj: Petro el Alcantara kaj Antonio el Padova, La barokstilan preĝejon projektis de Tylman van Gameren. La ĉefaltaro troviĝas impona skulptaĵo de Krucumita Kristo skulptita de Andrzej Schlüter.

**Liw** - vizitado de la muzeo en la kastelo de la mazoviaj dukoj.

**Sowia Góra** - panoramloko super la valo de la rivero Liwiec, kaj ĝiaj grandaj kaj neregulaj meandroj. Danke al la multnombraj birdoj kaj nepoluata pejzaĝo, la Valo Liwiec estis inkluzivita en la Protektan Pejzaĝan Areon Siedlce-Węgrów kaj aligita al la "Areo Natura 2000".

**Chlewiska**, - historia loĝdomo de la Rózański-familio, nuntempe la "Reymontówka" - Kreiva Labordomo. En la jaro, 1926, la grandbieno kaj 300 hektaroj da tero estis aĉetitaj de la Rózański-familio fare de Aurelia - la vidvino de Władysław Reymont. Ŝi uzis parton de la mono rivevitan de Reymont kiel Nobelpremio pro la romano "Chłopi".

*Noto: pro kialoj ekster la kontrolo de la organizantoj, la la vojo kaj la ordo de vizitaj lokoj povas ŝanĝiĝi.*

### Pagoj:

Aliĝkoto ĝis 30.4.2023			
PEA- membroj	Ne PEA-membroj	Eksterlandanoj A	Eksterlandanoj B
50,00 zł.	60,00 zł.	20 euro	15 euro
Aliĝkoto ĝis 30.06.2023			
PEA-membroj	Ne PEA-membroj	Eksterlandanoj A	Eksterlandanoj B
60,00 zł.	70,00 zł.	25 euro	20 euro
Aliĝkoto post 1.07.2023 kaj surloke			
PEA-membroj	Ne PEA-membroj	Eksterlandanoj A	Eksterlandanoj B
75 zł	85 zł	30 euro	25 euro

B- personoj el eksocialismaj landoj, A- personoj el aliaj landoj

### Kongresejo:


Loko de ĉijara kongresejo ankoraŭ ne estas elektita. Certe ĝi troviĝos proksime al. la trankejo - studenta domo n-ro 5, kiu situas ĉe la str. Żytnia 17/19. En ĉefsalono de la studenta domo daŭras renovigaj laboroj, kiuj laŭ promeso de la universitato, devas esti finitaj ĝis aprilo.

### Trankejo:

Studenta Domo n-ro 5 de Universitato Naturscienca kaj Humanisma en Siedlce ĉe la str. Żytnia 17/19. Ĉirkaŭ 100 lokoj atendas gastojn en duĉambraj segmentoj kun tute ekipita kuirejo kaj banĉambro. Ĉiuj ĉambroj havas interretan aliron, pordotelefonojn. Krome, la konstruaĵo havas vestolavejon. **Prezo:** 50 zlotoj po nokto/persono. Distanco inter la trankejo kaj la stacidomo - 1,7 km, piede 21 min., per aŭto 7 min.



**De la stacidomo al la trankejo eblas vojaĝi per la buso n-ro 3** - haltejo ĉe la str. Armii Krajowej/Sienkiewicza (3 haltejoj) ĝis la strato Sokołowska 28.– **aŭ per la buso n-ro 20** haltejo ĉe stacidomo ĝis strato Żytnia – (6 haltejoj)



## Centro de Siedlce

← Tranoktejo, str. Żytnia 17/19

← Stacidomo

